

ENKETO por INDONEZIAJ ESPERANTISTOJ

Heidi Goes, Belgio

Saluton!

Ĉi tiu enketo estas adapto de la enketo kiun mi, Heidi Goes, disdonis kaj plenigis dum miaj unuaj instruvojaĝoj en Indonezio. Tiu enketo celis scii iom pri kiuj venis al miaj lecionoj/enkondukoj, kial ili volis lerni Esperanton kaj ĉu hazarde ili jam antaŭe aŭdis pri Esperanto aŭ eĉ jam lernis antaŭe. Multe ŝanĝiĝis en Indonezio de antaŭ 6 jaroj, kiam mi disdonis la unuajn enketojn (en Batam, la 9an de novembro 2009). Mi tre scivolas ĉu ŝanĝiĝis la konsisto de tiuj kiuj interesiĝas pri Esperanto, kiel la progresintoj vidas la movadon, ktp. Plie, mi daŭre estas verkanta libron pri la historio de la Esperanto-movado en Indonezio (la verkado prokrastiĝis plurfoje pro la multa laboro ligita al la instru-vojaĝoj, kiuj prenis ĉiujn miajn feritagojn kaj momente pro doktoriĝaj studoj) kaj opinias ke la komenco de la nuna movado jam povas eniri tiun historion. Tial mi relanĉas la enketon, adaptitan, kaj nun ankaŭ en Esperanto. Do mi tre dankas jam antaŭe al ĉiuj kiuj plenigas la enketon, kaj helpas disvastigi ĝin.

Kelkaj klarigoj

Lingvo

Bv. respondi en Esperanto se vi povas. En la indonezia ankaŭ eblas por tut-komencantoj. Uzu eventuale la indonezi-lingvan version de tiu ĉi enketo.

Anonimeco

Vi rajtas ne mencii vian nomon en ĉi tiu enketo kaze ke vi havas iun kialon por tio. Tamen sciu ke en la publikaj rezultoj de la analizo ne estos menciitaj nomoj. La nomo helpas foje por kompreni respondojn aŭ por povi kontakti vin kaze ke io ne klaras. Estas preferinde do meti vian nomon, sed se vi ne volas, tamen plenigu la enketon, sen via nomo. Tiukaze eble petu amikon (nekonatan al mi) por sendi la enketon al mia retadreso.

Kiel plenigi?

Mi ne lasis spacon inter la demandoj. Haveblas la doc-versio, kaj ĉiuj povas tajpante la respondojn libere fari spacon por la respondoj. Se vi volas skribi aŭ sendi nur la respondojn, sufiĉas noti la numerojn de la demandoj.

Kien sendi?

Bv. sendi la respondojn al mia retadreso: heidi.goes@gmail.com. Dankon!

1. Personaj datumoj/Data personal

Plena nomo:

Retadreso:

@

Aĝo: jaroj

Plej alta eduko:

Fako:

Urbo:

Provinco:

2. Ekscio

- a) Kion vi opiniis pri Esperanto antaŭ ol eklerni Esperanton?
- b) Kiam vi eksciis pri Esperanto?
- c) Kial vi decidis eklerni Esperanton?

3. Kursoj (por tiuj kiuj sekvis kurson)

- a) Kiel vi eksciis pri la kurso kiun vi sekvis?
- b) Pri la kurso mem:
 - Loko/Tempat:
 - Dato/Tanggal:
 - Instruisto(j)/ Guru:
 - Komentar:
 - Kion vi opinias pri tiu kurso, la enhavo, la uzita materialo, la maniero instrui?
- c) Post kiam vi sekvis la kurson, kion vi opiniis pri Esperanto? Ĉu via opinio pri ĝi ŝanĝiĝis rilate al antaŭ la kurso?

4. Memlernado (se vi neniam sekvis kurson)

Se vi lernis sendepende de kurso, kiel vi lernis? Kiujn lernilojn vi uzis? Ĉu tio bone funkciis? Ĉu vi havis iel helpon?

5. Post la lernado

- a) **Lernado.** Ĉu vi plulernis post la kurso? Ĉu vi plulernos? Ĉu vi lernas sola? Kun aliaj? Kiuj? En klubo? Kiu klubo?
- b) **Interreto.** Kiujn retpaĝojn vi uzas por informiĝi pri Esperanto (nacia kaj internacia movado kaj lernado). Ĉu vi konas Lernu.net? Se jes, kiel vi uzas ĝin? Ĉu vi uzas la sociajn retojn por kontakti Esperantistojn aŭ lerni pli pri la lingvo aŭ la movado?
- c) **Loka movado.** Ĉu vi aktivis en iu klubo aŭ alimaniere por la movado en via regiono/urbo? Se jes, bv. rakonti pri tio kion vi faras, kial, kun kiaj rezultoj, ktp. Se ne, bv. diri kial ne.
- d) **Nacia movado.** Ĉu vi aktivis por la nacia/landa movado en Indonezio? Se jes, bv. rakonti pri tio kion vi faras, kial, kun kiaj rezultoj, ktp. Se ne, bv. diri kial ne.
- e) **Unua nacia kongreso.** Ĉu vi ĉeestis la unuan Indonezian Esperanto-Kongreson? Se jes, bv. rakonti kion vi lernis tie pri la nacia kaj internacia Esperanto-movado. Se ne, kial ne (eble vi ne jam estis Esperantisto?)
- f) **Dua nacia kongreso.** Ĉu vi iros al la dua Indonezia Esperanto-Kongreso? Kiujn esperojn/atendojn vi havas pri tiu?
- g) **Internacia movado.** Ĉu vi havas spertojn pri Esperanto ekster Indonezio? Kiel tio helpas vin por esti aktiva en Indonezio?

6. Lastajn pensojn

Ĉu vi ankoraŭ havas ion kion vi volus komuniki? Proponojn? Kio laŭ vi estus la plej granda helpo al la indonezia movado en ĉi tiu momento?

Dankon!